Kubo kaj Brazilo plifortigas siajn rilatojn en pluraj agadkampoj.

La ambasadoro de Brazilo en Kubo, Cesáreo Melantonio, esprimis dum la XXXII-a internacia foiro de Havano ke ili celas fortigi la reciprokajn rilatojn kun la insulo en la bran?oj de bioteknologio, sano, ekstera komerco kaj edukado.

La? deklaroj faritaj al la gazetaro, la brazila diplomato esprimis ke la ?efa celo de Brazilo estas multobligi la merkaton de amba? landoj kaj allogi investistojn privatajn por eltrovi novajn negocajn platformojn kaj kreskigi la ekonomian ?eeston de Brazilo en la kariba regiono kaj en mezameriko.

Aliflanke, la kuba ministro pri ekstera komerco kaj fremdaj investoj, Rodrigo Malmierca, emfazis ke Kubo da?re laboras en la procezo por aktualigi sian ekonomian modelon kaj unu el la ?efaj laboroj estas impulsi la ?eeston de fremda kapitalo cele al evoluo.

Li elstarigis la gravecon de la unua dosiero pri negoceblecoj, prezentita en la internacia foiro kiu enhavas 246 projektojn de diversaj sektoroj, inkluzive tiujn de la Speciala Evoluzono de Mariel.

Li anka? dankis la partoprenon de oficialaj delegitaroj altnivelaj, venintaj el Brazilo kaj aliaj mondopartoj, per kiuj la foiro kontribuos unu plian fojon al diversigo de la kuba ekstera komerco en etoso respekta kaj sekura.

http://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/38763-kubo-kaj-brazilo-plifortigas-siajn-rilatojn-en-pluraj-agadkampoj

Radio Habana Cuba